

& Fredmana kanto n.ro 61-a:

< Ripete 6 sed rekante 4 el 25 batoj por strofo, entute 175 paŝoj dum 2 minutoj. Norda Kantaro #5190. Verkis Carl Michael Bellman (Fredmans sånger, 1791). Tradukis Martin Strid (2014).>

(#Melodio:

<:25> (

oomifa /sodo reTi do Soo;mifa sodo milredolTi do oo;mifa sodo reTi do Soo;mifa sodo milredolTi do o;do fa a;la so oo;mifa soSo doo;mifa soSo do

)×7)+

(&Strofoj:

'1 Bonan /tagon, frato dika, ; la botelon
ce2la2s mi. ; Mi ne konis pli amikan, ;
do bonvenu fe2sto2n ĉi. ; Je san'! ; Je
san'! ; Restu jam ĉe ni! ; Restu jam ĉe
ni!

'2 Vin, amiko, forto vetas, ; gaja tro
aspe2kta2s vi. ; Komplimentojn for, mi
petas, ; bele nun kisi2ĝu2 ni. (×; **Je
san'! ; Je san'!** ;) (Nun kisiĝu ni!)×

'3 Vi el kie venas, ronda, ; el Mozelo
a2ŭ e2l Rejn? ; El Bordo2' aŭ fino
monda? ; Tamen bonas vi2 po2r vejn'.
..... (Bonas vi por vejn'.)×

'4 Gorĝo mia longe sonĝis ; vin,
malnova ka2ma2rad'! ; Nun malsupren
en ĝin plongu ; sen iama re2ve2nad'!
..... (Sen la revenad'!)×

'5 Nu, ni drinku, bravaj kuzoj, ; Hej!
Kuraĝon, bo2nmi2en'! ; Lasu kolojn iĝi
kluzoj ; kien vino ve2la2s en. (Vino
velas en!)×

'6 Dank' al di' pro ventro, buŝo, ; sed mi
ne kapa2bla2s pli. ; Miajn fortojn
kaptas kuŝo. ; Glason ne plu vi2da2s
mi. (Ne plu vidas mi.)×

'7 Voku pastron por apero, ;
testamenton tu2j spe2cif'. ; Sed mi
drinkos la ceteron, ; por ne morti e2n
so2if'! (Morti sen soif'.)×)